



2

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

FEBRUARO 1962

E N H A V O

	Paĝo
* * * Pri la instruado de Esperanto	1
A. Ĥaĉaturjan, G. Rubljov. Amikeca valso (kanto)	2
Nedjalka Genova. Iam griziĝis la hararo de dudekjaruloj (rakonto)	3
Ivan Sarafov. Atanas D. Atanasov — Ada (okaze de lia sepdeka datreveno)	5
Atanas D. Atanasov — Ada. El „Rememoroj de Esperantisto“	7
Minko Conkovski. Edwarda Kaminska rakontas pri la koncentrejoj de la morto	9
Ivan Canev. Mia sperto	11
III-a tutlanda esperantista junulara balo en Ruse	15
Societa vivo.	16

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifo : 0,5 levoj por cm²; korespondanoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 100 lv.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Jvan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO

Pligrandiĝis la intereso kaj la emo en nia lando al lernado de Esperanto. Ĉiuj societoj jam organizas pluajn kursojn. Kursoj estas gvidataj ankaŭ en multaj lernejoj. Krome, en kelkaj distriktoj la instruado de Esperanto en la lernejoj estas oficialigita, kaj la lernejo pagas al la lektoro kiel al la ceteraj gvidantoj de lernantaj rondoj. Tio estas granda sukceso de la enlanda Esperanto-movado. La sperto de tiuj ĉi distriktoj devas esti pristudita kaj aplikita en la ceteraj partoj de la lando. Multaj lernas la internacian lingvon ankaŭ en la korespondaj kursoj, kiuj donas bonan rezulton.

Tiu granda intereso al la lernado de Esperanto nin devigas plialtigi la nivelon de la instruado. Multaj el la kursoj nun ne donas rezulton pro la malsperteco de la instruantoj. Grava tasko de la societoj kaj de la asocio en la nuna etapo estas eduki bonajn propagandistojn kaj kursgvidantojn. La asocio starigis la komencon de tiu aktiveco per la dumkongresaj ekzamenoj en Varna kaj Târnovo kaj la pasintjara kurso por instruantoj en Druĵevo. Tio estas bona komenco. Sed ĝi devas plivastiĝi kaj pliboniĝi. La ekzamenkomisionoj devas esti pli postulemaj kaj pli severaj, se ni deziras, ke la diplomoj estu pli aŭtoritataj. Ni havas informojn, ke en iuj lokoj tiuj diplomoj estas postulataj de oficialaj organoj ĉe gvidado de kursoj en lernejoj. Konsiderante la sperton en Druĵevo ni devas plibonigi la organizon, la programon kaj la pedagogian laboron de la instruistaj kursoj. La societoj ne devas sin kontentigi nur per la centraj aranĝoj. Interŝanĝo de sperto inter la kursgvidantoj de la urbo, organizo de distriktaj instruistaj konferencoj, montraj modelaj lekcionoj estus utilaj kaj kontribuus pri la plialtigo de la instrunivelo.

Tiucele ni iniciatas la malfermon en BE de rubriko por la Esperanto-instruisto, en kiu ni prezentos al la legantoj lekcionojn de iuj kursgvidantoj por pridiskuto, metodikajn konsilojn, rakontojn de instruistoj pri ties spertoj. Tiu iniciato havos sukceson nur se la kursgvidantoj aktive partoprenas en ĝi. En tiu ĉi numero ni publikigas lekcion de sofia kursgvidanto. Ni atendas opiniojn kaj rimarkigojn.

Fer la plialtigo de la instrunivelo ni plialtigos la nivelon de la scio kaj de la lingvo-uzado.

AMIKECA VALSO

Teksto: Georgij Rubljov

Muziko: Aram Ĥaĉaturjan

En valsa: tempo.

1. Sin su-tas lum' de sun-ra-di' en
 la la-zu-rc for, ko-lom-boj blan-kaj
 su-per ni ron-du-mas en bril aŭbril a. Kna-
 bi-no val-sas el Vjet-nam'en-ma-ne kun la
 franc' Ja es-tas rid', o-ku-la flam' a-
 test' pri a-li-anc' Retreno A-mi-kaj nun kun
 gaj-a kor' kan-ta-das en la rond', ko-
 lom-be en la maj aŭ-ror' tra-
 flu-gas kant'en mond' 1. 2. Kaj-lac'



Sin ŝutas lum' de sunradi'
 en la lazura for,
 kolomboj blankaj super ni
 rondumas en bril-or'.
 Knabino valsas el Vjetnam'
 enmane kun la franc'.
 Ja estas rid', okula flam'
 atest' pri alianc'.

Refreno

Amikoj nun kun gaja kor'
 kantadas en la rond',
 kolombe en la maj-aŭror'
 traflugas kant' en mond'.

Kaj pretas ĉiam junular'
 amiki sur la ter',
 kaj servos ni per vol' kaj far'

al paco kaj al ver'.
 Ni ne permesos, ke la sun'
 forcedu al obskur',
 ni ĉiam vivos ekde nun
 en helo kaj purpur'.

Refreno

Feliĉaj per la amikec',
 por ni ekbrilos tag',
 ni marŝas vikle al progres'
 per kantoj kaj per ag'.
 Ja estas nia ideal'
 fratiĝo kaj la pac',
 por ĝi ni vokas al batal'
 sen halto kaj sen lac'.

Refreno

Tradukis Violin OLJANOV

IAM GRIZIĜIS LA HARARO DE DUDEKJARULOJ

Kiam oni ekparolas pri la pasinteco, mi ĉiam rememoras la vortojn de mia fratino: „Homo, kiu neniam falis en la manojn de la malamikoj, havas nenian ideon pri tiu teruraĵo. Nur la spertintaj tion, kiel arestitoj en la policejoj, povas prezenti al si kia estis la tiama situacio...“

Jam dekse jarojn la libero lumas super nia lando. Libere kaj feliĉe kreskas niaj junuloj. Al ili mi volas nun rakonti pri tiu tempo, kiam subite griziĝis la hararo de dudekjaraj gejunuloj.

La 21-an de aŭgusto 1943 oni arestis min en la urboparto „Vostanniĉeski“ dum mi deĵoris en la apoteko, kie mi laboris kiel lern-praktikanto antaŭ mia ekzameno. La enigmo maltrankviligis min. De kie venis la fiasko? Kiu kalumniis min? Komence de marto 1942 mi estis laboratoria helpantino en la apoteko ĉe la stabo de la partizana zono. Kun la arestitoj en la kvartalo mi havis neniajn rilatojn. Plej diversaj pensoj furioze interpuŝiĝadis en mia kapo. Kies volon rompis la torturojn en la policejo? Kiun el la kamaradoj la kruelaj inkviziciaj torturoj igis malobservi la ĵurpromeson, donitan al la Partio? Oni enkondukis min en la tiel nomatan „Publika sekureco“.

La obskureco en la malliberejo igis min nevole ektemi. Malfacile mi per la piedoj tuŝesploris la ŝtuparon. Mia koro riskis krevi pro fortega batado. Oni enkondukis min en karceron, aŭ pli ĝustadire enpuŝegis min tien kaj malantaŭ mia dorso grince ekklakis la

rustiĝinta seruro, kaj post tio ĉio ekdronis en silento kaj mallumo, plena netrasidebla mallumo... Miaj okuloj iom post iom komencis akomodigi al la mallumece. Mi ĉirkaŭrigardis fikse — neniu estis tie. Mi troviĝis tute sola. Mi eksopiris aŭdi almenaŭ ian bruon, ies voĉon...

La saman vesperon oni komencis la inkviziciajn torturojn. La bastonado daŭris tutajn horojn. Mi pendis sur elektrotortura seĝo, kie oni bruldolorigis miajn nervojn, oni igis mian korpon saltkonvulsii pro suferego, igis sangadi mian mordsiritan langon. Oni kaptis multfoje mian hararon, levis mian kapon kaj poste puŝegis ĝin teren. Oni skurĝadis min kruele kaj post tio enbatis najlojn en miajn piedojn, sed mia karno estis sen viva kaj mi sentis nenion. Kunliginte miajn manojn kaj miajn kruojn, oni traigis inter ili bastonon, levis mian korpon supren je unu metro alte kaj poste malsuprenjetis min sur la plankon. Vere, granda latentata forto sin kaŝas en la homo. La popolo diras, ke la homa animo estas pli mola ol kotono, sed pli firma ol ŝtono. Sed per kiaj vortoj mi povus priskribi mian staton en la momento, kiam oni tenis miajn kruojn apogitaj al unu fenestro kaj lasis tiel mian korpon pendi kapomalsupren ĉe la dua etaĝo de la konstruaĵo? Mi sentis ke kvazaŭ elektra kurento trakuras de mia cerebello ĝis la piedfingroj kaj ree ekkuras returne al mia kapo. Tiam mi vidis, ke la morto troviĝas tre proksime de mi, tamen pleje doloris min la animo, ke mia vi-

rina naturo estas senpova venĝi per io ajn al tiuj monstroj, por kiuj la homa vivo valoras nenion. Kaj oni torturadis min tiamaniere kelkajn fojojn dum la nokto. Mia malfortika korpo tordigadis kiel serpento sub la frapoj de la skurgo kaj la elektra kurento. Sed mi kunpremīs la dentojn, mordis la lipojn kaj silentis. Ĉar la vortoj de la tiama komandanto de la partizana zono Georgi Ječev neniam eliris el mia cerbo: „Plej grave estas elteni ĉion. Se vi konfesos ion, oni denove batos vin, kaj poste pendumos vin.“ Sed tiuj murdstoj kapablis elpensi plej diversajn manierojn de torturado. Ili celis ne nur fizike, sed ankaŭ psike kripligi kaj mortigi min. Ili konstante serĉis malkovri iun plej malfortan trajton de mia karaktero, iun plej malgrandan manifestadon de varma sento al iu persono, plej etan maltrankvilon pri iu homo, por profiti tion. Sur la ŝuparo ili okazigis kvazaŭ hazarde renkonton kun mia frato. Elkondukinte min el la torturejo, oni post mi elkondukis lin tien, kaj tiamaniere oni disŝiradis pro sufero mian koron. Ĝi sangis pro doloro, ke mia sampatrina frato estas submetata al la samaj torturoj. Eĉ mi estis preta, mi ja preferis ekŝidi milojn da fojoj sur la elektrotuturan seĝon anstataŭ mia proksimulo, por ke li ne falu en iliajn manojn.

Pli ol du semajnoj mi kuŝis en la karceron № 6 tute sola. Lufoje mi restis tie en la kompanio de fortranĉita partizana kapo, kiun la policanoj estis piedpuŝegintaj sub la pordon de mia ĉelo kaj lasis ĝin ĉe mi.

Estis en la antaŭtago de septembro. Iun vesperon, post kelkhoraj inkviziciaj torturoj, mi svenis kaj poste rekonsciigis, vidante min en flako da sango. Antaŭ mi ekstaris tute serioze la demando ĉu mi devas ankoraŭ vivi. Miaj manoj estis enkatengitaj, sed en mian veston mi antaŭe estis enkurndinta 50 centigramojn da veneno. Per la buŝo mi povus atingi la venenon. Estis necesa nur unu momento, por ke mi liberigu min de la turmentegoj kaj la hontigoj. Estis kvieti stelplena nokto. La stratoj — senhomaj. En la aero ŝvebis nur la apenaŭ aŭdebla bruoj de la arbofolioj, milde lulataj de la vento. En la ĉelon penetris kelkaj lunradioj. En tiaj ĉarmaj noktoj oni havas la deziron vivi pli longe, labori kaj ĝui la vivon. Kaj mi estis nur en la aĝo de dudek jaroj, ankoraŭ neniu mi estis aminta, mi ne konis la vivon... En tiu sorto-decida vespero tamen mi komprenis kiom forta, kiom potenca estas la sopiro al la vivo!

Kaj denove torturoj! Iun matenon, post teruraj inkviziciaj turmentoj, mi perdis konscion dum kelkaj horoj kaj la policanoj intertempe estis elĉeligintaj min, metinte mian senmovan korpon kuŝi sur unu tabulo antaŭ la pordo mem. Dume en la kvartalo oni disfamigis la sciigon, ke „la apotekistino ne el-

tenis la bastonadon kaj mortis.“ Kara, amata mia panjo, nur nun, kiam mi estas patrino de du infanoj, mi komprenas kion vi estas travivinta tiutempe. Kiom da sendormaj noktoj kaj maltrankvilegoj vi travivis pro mi! Post tiu sciigo, mia panjo kun fleksiĝintaj pro teruro kruroj, ŝanceligante, sin estis direktinta al la malliberejo, por demandi pri mi...

Mi neniam forgesos ankaŭ unu septembran vesperon. Laŭlonge de la koridoro aŭdigis paŝobruoj de homo en botoj. La paŝoj de la policano haltis ĉe nia ĉelo — depost kelkaj tagoj mi estis translokita en la grandan virinan karceron. La ŝlosiloj malbonsigne ekklakis. La pordo estis rapide malfermita. Mi aŭdis, ke oni vokas mian nomon. Ĉirkaŭrigardinte, mi renkontis kunsentajn rigardojn. Mi ekhezitis ĉu mi devas ekiri. La policano ekpuŝis min krude, dirante: „Nu, eliru tuj, ni eskortos vin al Kriĉim! Miaj kamaradinoj ektemris, hirtigis. Eble neniam plu ni vidos nin reciproke. Neniu scias ĉu post tiu „promenado“ ĝis vilaĝo Kriĉim mi revenos. Oni per puŝoj enirigis min en unu ŝarĝaŭtomobilon. Ĉirkaŭ mi gardstaris dekkvin kompletaj armitaj civilaj policagentoj kaj policanoj en uniformoj. Ĉu la nuntempaj junulinoj povus eĉ imagi kion mi travivis tiumomente inter tiu luparo? Oni ekveturigis min al la fervojstacio Kriĉim, kun la preteksto, ke mi devas elserĉi kaj montri al ili mian kunlernantinon, kiu estis fariginta partizanino kaj troviĝis en tiu regiono. Tio estis unu el multaj manieroj de la policanoj por turmentadi la arestitojn. Kaj tiuj ebriaj policanoj neniel hezitus pafi kontraŭ la arestitoj. Ja iliaj subitaj kapricoj, iliaj manieroj de torturado estis senfinaj.

Sesdek kvin tagojn mi pasigis en la policejo. La ĉeloj estis plenplena de arestitoj — viroj, virinoj, infanoj kaj eĉ suĉinfanoj troviĝis tie. Ni estis devigitaj dormi sur amaso da ŝtonkarbo. Pedikoj kaj cimoj sarme rampis sur ni. Tamen ĉio ĉi ne sukcesis rompi nian spiritforton. Vespere ni kantadis komponitan de ni mem kanton:

Oni batas mian bruston,
kaphararon mian ŝiras,
ke mi estas komunisto,
tamen baldaŭ venos tago,
kiam ni nin elĉeligos,
ni liberon plene ĝuos.

Ni kantadis ankaŭ: „Ĉu vi rememoras tiun malfruan aŭtonon?“ „Skarlata Papavo“ kaj aliajn kantojn. Tio furiozigis la policanojn kaj denove oni bastonadis nin ĝis morto.

Post du monatoj la juĝesploro pri mi estis finita. Oni skurgis min kruele kaj forkondukis min en la malliberejon. Tie miaj kamaradinoj ĉirkaŭis kaj flegis min per specialaj zorgoj kaj mi tre rapide komencis resaniĝi. Post dudek tagoj oni ree okupis sin pri mia proceso. Pro manko de pruvoj kaj kulpokonfeso de mi,

ATANAS D. ATANASOV — ADA

(okaze de lia 70-a datreveno)

Atanas D. Atanasov — Ada, konata bulgara esperantisto, elstara vortaristo, aŭtoro de lernolibroj kaj originalaj esperantaj verkoj, naskiĝis je la 12-a de februaro 1892 en Sofio.

Pri Esperanto Ada eksciis hazarde ĉirkaŭ 1903—1904. La ideo pri komuna internacia lingvo plaĉis al li kaj li fariĝis ĝia adepto por ĉiam. En 1905 li renkontis por unua fojo esperantiston en la persono de Georgi Karastojanov, kiu donis al li kvar mallongajn lecionojn pri kelkaj elementaj gramatikaj reguloj. Poste li lernis la lingvon laŭ la lernolibro „Esperanto en 10 lecionoj“ de Cart kaj Pagnier kaj la „Plena manokonduko“ de Hristo Popov kaj G. Oreškov.

En 1908 Ada komencis propagandi la lingvon inter siaj amikoj kaj konatuloj: Asen Mateev, Ivan Ĉolakov, Aleksandăr Ŝiŝmanov, Kamen Z. Kamenov.

En 1910, estante jam studento, Ada faris prelegon pri Esperanto en la Universitato, li sukcesis kolekti kelkajn unuopajn studentojn, kun kiuj li fondis studentan esperantistan grupon. La grupo vivis ĝis 1912 (la komenco de la Balkana Milito). Oni malfermis tri sinsekvajn kursojn de Esperanto por studentoj, eldonis flugfoliojn, aranĝis literatur-muzikajn matenfestojn en la Universitato. En 1910 Ada estis sekretario de la grupo, en 1911—1912 — ĝia prezidanto. En 1910 li estis reprezentanto por Bulgario de Universala Studenta Unio (centra sidloko en Budapeŝto).

En 1911 Ada fariĝis sekretario de la Bulgara Esperantista Ligo. Post la transformiĝo de la ligo en Bulgaran Esperantistan Societon Ada estis ĝia sekretario kaj en la sekvanta 1912 li estis destinita por redakti la projektatan organon de la societo „Bulgara Esperantisto“ (kiu ne povis tiam komenci sian aperadon pro la milito).

En 1912 laŭ invito de Ada prof. D-ro Ivan D. Ŝiŝmanov faris en la Universitato je la nomo de la Studenta Esperantista Grupo sian konatan prelegon „Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helplingvo?“.

En 1920 Ada estis elektita vicprezidanto de la Bulgara Esperantista Societo. En 1925 li ekis kiel vicprezidanto.

En 1923—1924 Ada estis reprezentanto por Bulgario de la Scienca Esperantista Asocio.

En 1924 li estis prezidanto de la tiam Bulgara Esperantista Kooperativo.

Dum kelkaj jaroj Ada estis delegito de UEA en Sofio kaj poste ĉefdelegito por la bulgara teritorio.

En 1927 li estis elektita kiel prezidanto de la landa organizaĵo (jam nomata Bulgara Esperantista Asocio). Tiun ĉi postenon li forlasis post la kongreso en Vraca (1928). En 1936 li denove estis elektita prezidanto de la asocio ĝis 1944.

En 1926 kaj post tio en tri sinsekvaj kongresoj de la bulgaraj esperantistoj oni proklamis lin honora membro

mi estis finfine liberigita. Kaj denove mi aliĝis al la armeo da batalantoj.

* * *

Multajn tagojn mi ne estis vidinta mian fratinon. La malamiko delonge estis disiginta nin. Kaj kiam en la unua tago de la libero ni ree intervidiĝis, mi estis konsternita.

Ŝia hararo estis griziĝinta, tamen la okuloj ankoraŭ pli vive kaj pli flame lumis. Tiam ŝi komencis rakonti al mi sinsekve ĉion travivitan.

Ĉu estas forgesblaj tiuj tagoj?

Tradukis Apostol PENĈOVSKI
Simeon M. SIMEONOV

de la asocio, malgraŭ ke li ne akceptis tiun honoron.

Ada prezidis la kongresojn de la bulgaraj esperantistoj en la jaroj 1927 (la eksterordinara), 1930 (en Sofio), 1937 (en Pazargik), 1938 (en Sevlievo).

Li estis prezidanto de la Sofia Esperantista Societo en 1923 kaj ankaŭ en 1927—1929 (post la unuigo de la kelkaj Sofiaj sekcioj de Bulgara Esperantista Asocio en unu ĉefurban societon).

En sia multjara agado Ada gvidis jenajn kursojn:

1910—1912 en la Universitato 3 kursojn, por civitanoj en Sofio 2 kursojn; 1921 — por civitanoj en Sofio; 1924 — 2 kursojn por civitanoj (en majo kaj en novembro); demonstracian trilecionan kurson dum la verda semajno; same tian kurson en la sekvanta verda semajno. En 1927 — kurso de Esperanto por kursgvidantoj. Oficiale li instruis Esperanton en la kurso por progimnaziaj instruistoj, aranĝita de la Ministerio de Popola Instruado en 1921, kaj en la kursoj de fremdaj lingvoj por poŝtoficistoj ĉe la Direkcio de la Poŝtoj en 1932.

Ada faris ankaŭ multajn prelegojn: 1910 — ĉe la Universitato; 1912 — publika kunveno en Sofio okaze de la 25-a jara jubileo de Esperanto; 1913 — ĉe la Sofia Kulturdomo (legejo) „Aleko Konstantinov“; 1919 — en la jara kongreso de la bulgaraj esperantistoj; 1921 — ĉe la Kulturdomo (legejo) „Aleko Konstantinov“; en publika kunveno kunvokita de la Sofia Komercesta Societo en la salono de la Sofia Komerco-Industria Ĉambro je temo „Esperanto en la komerco“; salutparolado al la kongreso de la Asocio de la Mezgradlernejaj (gimnaziaj kaj progimnaziaj) Instruistoj; en publika kunveno en Kjustendil; 1922 — en publika kunveno en Poduene; en speciala kunveno kunvokita de la Societo de la Bulgaraj Verkistoj kaj Publicistoj; en publikaj kunvenoj en Plovdiv, Pazargik kaj Kolarovgrad; en la gimna-

zioj — knaba kaj knabina — en Ruse por gimnazianoj; 1924 — dum la verda semajno en februaro (24. II, 2. III), dum la verda semajno en novembro (2. XI, 8. XI — ĉe la Universitato); 1925 — en publika kunveno en Vraca. En 1932 — dek prelegoj pri Esperanto, ĝia esenco kiel ideo kaj kiel lingvo, ĝia aplikado en diversaj sferoj de la vivo, ĝia signifo, ĝia movado, literaturo k. c. — per Radio Sofio.

Krom tio, Ada faris prelegojn en Esperanto en kunvenoj de la sofiaj esperantistoj je diversaj temoj: lingvaj, literaturaj, historiaj k. c.

Literatura agado de Ada: en apartaj libroj aperis: „Bulgaraj rakontoj“ de Iv. Vazov (Berlin, I eld., 1910; III eld. — 1924); „La fonto de la blankpiedulino“ de P. R. Slavejkov; „La familio Gerak“ de Elin Pelin; „Kvar rakontoj“ de Elin Pelin.

Originalaj verkoj de Ada estas: „Rememoroj de esperantisto“, „El la intima libro de la verdurbaj esperantistoj“.

Ada verkis jenajn lernolibrojn: „Lernolibro de Esperanto“ de At. D. Atanasov kaj Pan. Kolev (1922), „Kurso de Esperanto por bulgaroj“ — ĝis 1949 naŭ eldonoj en sume 45 000 ekzempleroj. En 1911 — „Praktika gramatiko de Esperanto“.

Li faris multajn tradukojn el la bulgara literaturo, kiuj estis presitaj en diversaj Esperanto-gazetoj: „Bulgara Esperantisto“, „Romana Esperantisto“, „Danubo“, „Lingvo Intrinacia“, „La Ondo de Esperanto“, „La Duonmorta“ k. a. Krom tio, li verkis multajn artikolojn en Esperanto, same en bulgara lingvo pri Esperanto.

Dum kvin jaroj Ada redaktis la gazeton „Bulgara Esperantisto“.

En „Esperanto kaj kulturo“ (Internacia Pedagogia Revuo — Francio) aperis lia kurso „Lernu kaj instru“, kelkaj lecionoj el ĝi aperis ankaŭ en la lastaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“.

EL „REMEMOROJ DE ESPERANTISTO“

Ĉapitro XXVII

Kaj tiel do, ni mobilizis la malmultajn restintajn fortojn de la bulgara esperantistaro en la Bulgaran Esperantistan Societon, ni donis unu gravan sukceson al la movado, kaj ni ekgvidis la aferon laŭ nova vojo al serioze ekpensita agado. La provinco ankoraŭ estis senmova post la travivitaj krizoj, sed de kelkaj lokoj jam laŭtigis esperigaj voĉoj: ni estis en la matena krepusko de nova tago.

En Sofio ni laboris vigle kaj kun granda espero. Baldaŭ, baldaŭ vekigis la provinco — tion ni kredis.

Dum la unua societa jaro (1911—1912) organo de la Societo restis tradicie „Danubo“ — tamen nun ankoraŭ pli malforte subtenita de bulgaraj abonantoj. Ĝin minacis financa krizo kaj la Societo povis helpi neniel. La minaco fariĝis ankoraŭ pli serioza, kiam en la fino de decembro 1911 en Bukureŝto subite mortis D-ro Gabrielo Robin, la prezidanto de la Rumana Esperantista Societo, animo kaj subtenanto de „Danubo“ en tiuj jaroj. Lia morto estis granda perdo por la movado en Rumanujo kaj efikis sur la sorton de „Danubo“. Dum aprilo, 1912, mi estis vokita en Ruse, kien venis ekskurse la bukureŝtaj gesamideanoj, — tien vokis min Ĥristoskov kaj la nova prezidanto de la Rumana Esperantista Societo — la advokato Al. Pr. Teodorescu, por interŝanĝi pensojn pri la stato kaj la estonteco de „Danubo“ — nia komuna organo. Ili prezentis al mi la financon staton de la gazeto — plorinda! Nenion konsolan flanke de la Bulgara Esperantista Societo mi povis diri al ili.

Kaj post la 7-a numero de sia dua jaro la bonega „Danubo“ ĉesis aperadi.

En la fino de la somero de 1912 la Bulgara Esperantista Societo jam havis sian unuan jarkunvenon (kongreson). Estis pasinta tuta jaro en organiza laborado kaj ni intencis jam alpaŝi al pli vasta kaj serioza laboro por propagando.

La jarkunveno elektis novan komitaton kun prezidanto Simeon Petkov kaj sekretario Ivan Nenov. Ni estis jam sukcesintaj altiri al ni ankaŭ la homojn de la dua esperantista generacio ĉe ni, kiuj ĝis nun staris ekster la movado.

La unua tasko de la nova komitato estis komenci la eldonon de presorgano kaj garantiĝi ĝian ekziston. Ni decidis komenci la eldonon de monata dulingva propaganda gazeto „Bulgara Esperantisto“. Por garantiĝi ĝian vivon, ni organizis specialan fondon: ĉiu el ni promesis pagadi monate 5 aŭ 10 levojn por tiu celo (tiam 60—90 levoj sufiĉis por presigo de unu gazetnumero).

Ĉio estis preta. Ni traktis kun presistoj kaj preparadis jam la materialon por la unua numero de la gazeto. La afero marŝis plenvaporo. Ni estis sur la sojlo de nova epoko, en kiun ni estis alpaŝantaj kun granda kredo kaj kuraĝo...

Sed subite...

Subite la Historio ekstaris sur la vojo de nia laboro kaj baris nian marŝon.

— Mi marŝas sur bulvaroj „Car Osvoboditel“. Pluvetas. Antaŭ la dolĉaĵejo „Car Osvoboditel“ (kontraŭ la Sofia Oficira Klubo) staras areto de ĵurnalistoj kaj interbabiladas. El ili apartiĝas Panajot Ĥitrov, nia samideano, kaj demandas min: „Ĉu morgaŭ la Centra Propaganda Komitato havos kunsidon?“

— Nepe... se ĝis tiam ne okazos „io“.

— Ŝajnas al mi, ke ĝuste hodiaŭ okazos... ni atendas ĉiumomente la sciigon, diras Ĥitrov...

Kaj la „io“ okazis la saman tagon, posttagmeze je la 4-a horo. Estis deklarita la mobilizo por la Balkana Milito. Sofio perdis sian normalan vivon.

* Tiu ĉi decido povis realiĝi apenaŭ en 1919, post la Monda Milito!

En la lastaj jaroj Ada ankaŭ donas sian kontribuon al la movado. Li estas kunaŭtoro kaj kunredaktoro de Bulgara-Esperanta Vortaro, kiu aperis en 1961, kaj redaktoro de la Esperanto-Bulgara Vortaro, kiu eble povos aperi en la fino de 1962 aŭ en la komenco de 1963.

Ni deziras al nia ŝatata Ada longan vivon. Samtempe ni esperas, ke li donos sian kontribuon ankaŭ estonte en la diversaj sferoj de nia Esperantagado.

Ivan SARAFOV

Kompreneble, nenia kunsido de la Centra Propaganda Komitato okazis post tio . . .

Ĉapitro XXVIII

Jen . . . Anstataŭ labori por Esperanto en Sofio, mi vagas tra la montaro de la regiono de urbo Kârgali kun pafilo en la mano, kun tornistro sur la dorso. Malgrasa, malpura, longbarba, mi marŝas morte laca, mi dormas sub la ĉielo sur altaj montosuproj. Mi estas malsatego — oni ne povas alporti al ni regule panon, ĉar sur la kapraj vojoj, tra kiuj pasas nia taĉmento, ne povas marŝi ĉevaloj . . . Mi preskaŭ perdis min mem en tiu hunda vivo. Kiu mi estas? Kio mi estis antaŭe?

Malproksime, malproksime mi estas de tiu vivo, kiun mi vivis, de la esperanta laboro, de la novaj intencoj kaj iniciativoj. . . Ĉu en Sofio restis iu el la gvidantoj de la movado? Kie estas la ceteraj membroj de la Centra Propaganda Komitato? Kiuj el ili estas vivaj kaj kiuj jam ĉesis ekzisti en tiuj sangaj bataĵoj?

Mi ne sciis.

Kaj en la ceteraj landoj? Ĉu ankoraŭ bolas tie la movado same, kiel en la lasta tempo — la tempo de la glora Krakova Kongreso?

Mi estis tute forŝirita de tiu vivo.

Tamen ne. Ne tute.

En mia dorsako estas la kajero de la gazeto „Lingvo Internacia“. En la momento, kiam mi en soldata armigo estis forlasanta mian hejmon kaj kisis la tŭfoje la manon de mia patrino ĉe la pordo, la poŝtisto ĵus alportis ĝin kaj donis al mi. Mi prenis kaj instinkte ŝovis la gazetnumeron en la tornistron. Kaj portis ĝin al la milito. Mi ne havis ankoraŭ tempon trarigardi ĝian enhavon, sed mi portis ĝin kaj sentis ĝian ĉeeston.

Okazis foje, ke mi devis ĵeti mian tornistron. Nu, mi ĵetis ĉion — ne bedaŭrante eĉ la flakonon da mielo, sed la kajeron mi elprenis kaj konservis: mi ne povis ĝin forĵeti! (Hodiaŭ ĝi ankoraŭ estas gardata en mia biblioteko — sufiĉe ĉifona pro pluvoj, ŝvito k. c. — sed kara rememoraĵo por mi).

Ni estas en Keŝan, malgranda urbo en Sud-orienta Tracio. Ni jam ripozas. La bataloj estas ĉesigitaj. En la brita ĉefurbo kunsidas turkaj, bulgaraj, serbaj kaj grekaj delegitoj. Ili marĉandas por landopecoj, regionoj, urboj, vilaĝoj. Ni atendas la rezultojn.

Kaj en tiuj tagoj, kiam revekiĝas la espero reveni al la antaŭa vivo, mi jam pensas pri Esperanto, mi malfermas la numeron de la „Lingvo Internacia“ kaj soife sorbas la artikolojn. . . unue la raporton de Era pri la Oka en Krakovo. . . Mi legas kaj travivas la glorajn tagojn de triumfo. Mi ree estas la esperantisto. . .

Esperanto nun estas mia konsolo, ĝi denove varmigas min. Mi pensas pri la ceteraj samideanoj — ĉu ili estas pretaj post tiu tempesta tempo denove eklabori senlace por Esperanto?

La milito fermis la ĝisnunan epokon de la movado. Ni vidos, kiu restos aganta kaj kiu ne. Tiu ĉi paŭzo en la laboro certe havos sian efikon. Cetero, post la enlogiĝo en la aktualaj intereso, atendable la kvanto de la esperantistoj, aliĝintaj al la movado nur pro modemo, perdos ĉian emon rekomenci sian okupon je ĝi. Sed. . . tiu, kiu restos, li estos jam provita aganto. La milito purigos la movadon de la hazardaj elementoj, sed restigos esperigan, bonan materialon. Ĝi estas la provo por la agantoj. . .

Jes, la milito estis la vintro de la movado, sed mi pensis pri la printempo, kiu nepre devis veni post ĝi. Kaj en tiu vintro ĝermis novaj fortoj, preparis sin la nova epoko, kiam denove ĉio reekverdiĝos, floros kaj donos fruktojn. . .

Miaj amikoj, kun kiuj mi loĝas en Keŝan, interesiĝas pri mia legaĵo. Ili ĉiuj estas junuloj inteligentaj: studentoj de la Universitato kaj de la Art-pentra Lernejo, oficistoj, eĉ kelkaj gimnazianoj. Ili petas, ke mi instruoj al ili Esperanton. Kaj mi, kompreneble, tuj konsentas. Ĉiu el ili faras por si kajeregon el la folioj de iaj oficialaj turkaj registroj, kiujn mi trovis en unu oficejo de la urbo. Mi skribas lecionon, ĉiuj diligente reskribas ĝin en sian kajeron. . .

Kaj en la malserenaj tagoj ekĝermas Esperanto-semeroj.

Jen, ni estas en granda greka vilaĝo sur la bordo de la Marmora Maro, proksime al la bela urbo Rodosto. Ve, la intertraktoj en Londono ne havis la atenditan rezulton: la milito rekomenciĝos. Malespero ekregas nin, kaj niaj revoj ankoraŭ pli obstine kaj pli soife flugas al la bela vivo de la paco. . .

Vintru nokto. La vento fajfas ekstere, jen ploras, jen ridas, kaj minacas malice la tutan mondon. Muĝas kolere la maro, kaj kun obtuza bruoj plaŭdas sin ĝiaj ondoj al la bordo.

En granda ĉambro de la vilaĝa domo sidas ni maldorme. Petrola lampo ellasas nefortan, flavetan lumon. Miaj amikoj ankaŭ nun skribas diligente sian lecionon de Esperanto. En tiu terura vetero, en tiu granda malespero, eble ili en ĝi vidas la promeson pri la belaj tagoj de la estonteco. . .

Kaj ĝermas en la profundo de iliaj animoj la espero.

En la longa nigra nokto, ĉe la infera muĝo kaj bleko de la naturo, la okuloj avidas fiksa sin al la malforta lumo de la verda stelo, briletanta ie malproksime, malproksime, loganta kaj promesanta.

Kaj la animo atendas la aŭronon de la nova tago. . .



EDWARDA KAMINSKA RAKONTAS PRI LA KONCENTREJOJ DE MORTO

Pli ol tri semajnojn k-dino Edwarda Kaminska el urbo Gdansk, Pollando, estis kara gastino de nia lando. Sian ĉeeston ŝi utiligis por rakonti al nia popolo pri la teruraj tragediaj traviva-



ĵoj en la mondkonataj koncentrejoj de morto Oswiecim kaj Ravensbruck kaj por mobilizi la aŭskultantojn pri streĉa batalo kontraŭ la milito, por daŭra paco en la mondo.

Ŝi vizitis kaj faris paroladojn en Esperanto en la urboj Sofio, Plovdiv, Burgas kaj Varna.

En Sofio ŝi parolis en kunvenoj de Sofia Esperantista Societo „Maksim Gorkij“, de la poŝtistoj-esperantistoj kaj en legejo „Cirilo kaj Metodio“. En Plovdiv ŝi parolis en la klubo de Plovdiva Esperantista Societo kaj en Burgas — en publika kunveno, kiun partoprenis gelnantoj kaj geinstruistoj. En Varna k-dino Kaminska parolis

antaŭ kvar publikaj kunvenoj: en Ŝipkonstrua Uzino „Georgi Dimitrov“, en Lingva gimnazio, en Domo de Popola Floto kaj en aŭditorio 20 de la Universitato. La kunvenoj en la Lingva gimnazio kaj en la Universitato estis organizitaj fare de la Urba Komitato de Komsomolo en Varna.

Ĉiuj ŝiaj paroladoj en publikaj kunvenoj estis tradukitaj el Esperanto en bulgaran lingvon. Tiamaniere ŝi faris grandan per- kaj poresperantan propagandon. Kiam ŝi finis sian paroladon en la Lingva gimnazio en Varna, ŝi diris: „Eble interalie vi ekdemandos min, kian lingvon mi parolas?“ Ĉiuj spontane unuvoĉe respondis: „Esperanto“.

En plenplenaj salonoj, kun detenata spiro kaj eĉ kun larmoj, la ĉeestantoj, fikse rigardante la tatuitan sur ŝia brako koncentrejan numeron 55 034 kun triangulo apud ĝi, kio signifas verdikto por morto, streĉe aŭskultis kaj „englutis“ ĉiun ŝian kortuŝan vorton el la rakonto pri ĉiutage alterne viciĝantaj unu post alia bildoj de tragediaj teruraj travivaĵoj en la koncentrejoj.

Plej granda publika kunveno okazis en la aŭditorio 20 de la Universitato en Varna. Tie ŝi parolis antaŭ ĉirkaŭ 1000 gelnantoj kaj geinstruistoj el kelkaj gimnazioj. La direktoro de la Unua gimnazio Ljuben Andonov diris: „Neniam ĝis nun niaj gelnantoj aŭskultis tiel streĉe kaj atente paroladojn. Neniam ĝis nun ili estis tiel disciplinitaj en kunvenoj.“

En Domo de Popola Floto estis organizita kunveno por virinoj de militistoj. Ĝin vizitis ankaŭ multaj aktivuloj — viroj kaj virinoj el la kvar-talo. En tiu kunveno estis invitita paroli ankaŭ k-dino Kaminska. Post la raporto de marista kapitano de I-a rango Duno Petkov pri „La problemoj

de la internacia situacio“, oni donis la parolon al k-dino Kaminska.

Ĉirkaŭ 40 minutojn ŝi streĉigadis la atenton de la aŭskultantoj. Ili strebis eĉ unu vorton ne preterlasi. Multaj virinoj kaj eĉ viroj ploris.

Kiam ŝi rakontis, kiel SS-anoj apartigis gepatrojn de iliaj infanoj por aparte mortigi la gepatrojn kaj la infanojn kaj kiel la gepatroj kaj la infanoj kriege ploris, kiel dum oni gazumadis kaj bruligadis la gepatrojn, oni veturigis la infanojn en malproksiman arbaron por aparte bruligi ilin en grandegaj brulantaj kavoj, mi vidis multajn virinojn plorantaj.

Mi vidis ankaŭ alian ĉagrenan bildon. Apud mi sidanta virino havis ĉe ŝi ĉirkaŭ trijaran filineton. Kiam k-dino Kaminska rakontis pri la apartigo de la gepatroj de siaj infanoj kaj pri la forbruligo de la gepatroj kaj de la infanoj, ŝi ploris karesante kaj kisante sian infanon.

K-ino Kaminska priskribis interese, kiel ŝi evitis la morton dank' al la pola kuracistino D-ro Irena Konječna, helpe de la sekreta konspira organizado en la koncentrejo Osviencim, kiam oni alvokis ŝian numeron 55 034 por ŝin gazumi kaj forbruligi, oni transdonis anstataŭ ŝin, kadavron de ĵus mortinta virino. Tiumaniere ŝi estis savita de morto (ŝi ne plu ekzistis en la registroj de la koncentrejo). Priskribinte sian definitivitan liberigon el la koncentrejo Ravensbruck, ŝi finis per la jenaj vortoj:

— Karaj gekamaradoj! Vi aŭdis nur etan parton de la teruraĵoj en la koncentrejoj. Se mi devus ĉion detale rakonti, mi devus verki grandan kelkvoluman libron. Kiam en 1945 antaŭ ni malfermiĝis la pordegoj de hitleristaj koncentrejoj, kiam ni jubilis la finon de la milito, ŝajnis al ni, ke la vorto milito jam ne plu ekzistos en nia vortaro. Sed, bedaŭrinde, ni ĉiuj scias, ke apenaŭ pasis 16 jaroj de la milito, la imperiistoj, ĉefrunte kun Usono pre-

paras novan, eĉ pli danĝeran katastrofon. Kaj la teruraĵoj, kiujn ni travivis en la koncentrejoj, paliĝos kompare la pretigatan de ili atoman militon. Ni ĉiuj bone scias, kio okazis en Hiroŝima kaj Nagazaki.

Kontraŭe al la streĉaj penoj fare de Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj unigi Orientan kaj Okcidentan Germanion, la amerikaj imperiistoj kaj NATO faras ĉion eblan malhelpi la unuigon, enŝovante neakcepteblajn postulojn. Okcidenta Germanio toleras militajn krimulojn, kies konscienco estas ŝargita de la morto de miloj da senkulpaĵ homoj. Multaj el ili havas altajn postenojn en la okcidentgermana registaro, aliaj eĉ ricevas pensiojn.

Estas konata fakto, ke la iamaj SS-anoj tute malkaŝe strebas al nova milito, ili denove volas ĉronigi la homaron en sango.

Pollando, nia patrio, tro suferis de la lasta mondmilito. Ĝi estis preskaŭ tute ruinigita. Post la milito, dank' al nia laborista partio kaj al la helpo de Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj, ni tre rapide rekonstruis nian landon. Niaj urboj Varsovio, Gdansk, Wroclaw kaj multaj aliaj fariĝis nun eĉ pli belaj kaj modernaj ol antaŭe.

Nia nuna senpera najbaro okcidente estas amika Orienta Germanio kaj oriente apoge nin gardas nia fidela amiko la granda Sovetunio, dank' al kiu ni nun estas libera sendependa lando.

La imperiistoj bone taksas la potencon de la socialismaj landoj, en kies ĉiam pligrandigantaj vicoj, sub la gvidado de la granda Sovetunio, staras ankaŭ la granda Ĉina Popola Respubliko, Koreo, Vjetnamio, Kubo kaj granda parto de ŝtatoj en Afriko kaj Azio. Al ili estas tre klare, ke la laboruloj el la kapitalismaj landoj plejparte estas unuigitaj kiel batalantoj por paco.

Kamarado Nikita Ĥruŝčov ĉiam deklaras la starpunkton de Sovetunio pri paca kunekestado. Li tamen avertas, ke, se iu ajn el la socialismaj landoj



MIA SPERTO

Por la lernado kaj instruado de la lingvo, kiel ankaŭ por ĉiu sfero de la scienca kaj la socia agado, estas necesaj novaj vojoj, novaj manieroj kaj metodoj por atingi pli grandajn sukcesojn elspezante kiom eble plej malmulte da fortoj, plej malmulte da tempo.

Oni komprenas, ke ni en nia laboro nepre devas konsideri la postulojn de nia nova tempo, la postulojn de la organizita kaj planita laboro, la postulojn de la nuntempa metodiko por atingi plensukcese nian difinitan celon — bonan kaj korektan uzon de Esperanto — la bona interhoma komprenilo.

Ĉi-rilate saĝnas al mi, ke la specialistoj, la geinstruistoj-pedagogoj devas „diri sian kompetentan parolon“. Ili devas montri al ni, kiamaniere ni devas labori en la kursoj antaŭ la gekursanoj. Ni atendas tion delonge, senpacience. Tamen, dume ni ne devas mallabori kaj eterne atendi.

Mi, ĉi-sube, provos per miaj modestaj kapabloj montri al la gekursgvidantoj, kvankam ne estante bone preparita specialisto, kiamaniere mi laboras. Mi provos simple reprodukti lecionon, kiun mi instruis en la kurso por kursgvidantoj en Sofio dum la vintro 1960/1961.

Mi devis instrui, laŭ la plano, dek-unuan lecionon (laŭ la Kurso de Esperanto de Iv. Sarafov kaj S. Hesapĉiev). La gramatika materialo, kiun mi devis instrui, estis la sufiksoj: -eg-, -et- kaj -estr. Post bona pripenso mi alpaŝis al la preparo de la leciono. Mi utiligis la rakonteton „Mitingo por la paco“ el la lernolibro. Tamen mi ne utiligis la tutan rakonteton, sed nur parton de ĝi, sufiĉa por baza materialo. Mi reskribis ĝin permane en multaj ekzempleroj, sufiĉaj por ĉiuj gekursanoj. Hejme mi preparis la bildan materialon — pentritan kaj objektan. Mi pentris per grandaj literoj sur blankaj folioj

estus atakata, Sovetunio estas preta tuj helpi kaj defendi la minacitan amikan landon.

Kaj tion bone pritaksas la imperiistoj. La fortoj jam ne estas egalaj. La tempo antaŭeniras. Nia potenco kreskas kaj la ilia malfortiĝas. Kvankam ili minacas la mondon kun nova milito ili ne sukcesos. Sovetunio faras ĉion eblan eviti la militon. La decido de la registaro de Sovetunio eksperimenti siajn atomajn armilojn bridas ilian apetiton minaci la mondon per milito. Ĉiuj socialismaj landoj, ĉiuj progresemaĵoj homoj subtenas la decidon de Sovetunio eksperimenti siajn potencajn

atomajn bombojn kaj raketojn. Same la tuta mondo subtenas la proponon de Sovetunio pri faro de packontrakto kun ambaŭ germanaj ŝtatoj kaj la solvo de la Berlina Problemo kaj pri kompleta senarmigado.

Kamaradino Kaminska finis per la vortoj: „Nun ni volas vivi en trankvilo, ni volas labori kaj ĝui la liberon kaj la vivon. Ni kun kredo laboras kaj esperas je brila estonteco. Tial ni ĉiuj subtenas la strebojn de Sovetunio en la batalo por paco. Vivu la socialisma tendaro de la paco! Vivu la paco! For la militon!“

Minko CONKOVSKI

Unue:

Dekunua leciono
Mitingo por la paco
Sufiksoj: -eg, -et kaj -estr.

Due: la vortaro de la novaj, nekonataj 18 vortoj en Esperanto kaj traduko en bulgara:

grandega	—	огромен
placo	—	площад
plen-plena	—	препълнен
militestro	—	военачалник
milicestro	—	нач. милиция
civitano	—	гражданин
ĉeestanto	—	присъстваващ
laŭtega	—	моцен, силен
anonci	—	обявявам,
		съобщавам
svarmegi	—	гъмжа
flageto	—	знаменце
svingi	—	махам,
		размахвам
plaŭdi	—	ръкопляскам
delikata	—	нежен
najlo	—	гвоздей
ganto	—	ръкавица
kaŭĉuka ŝuo	—	шухон
pupeto	—	куклічка

La objekta materialo konsistis el komplektoj de ordinaraj objektoj, ĉu egaj, ĉu etaj: kraĵonoj, tondiloj, marteloj, najloj, tranĉiloj, flagoj, kaŭĉukaj ŝuetoj kaj pupoj.

La tabelojn kun la titolo de la leciono kaj la vortaron mi pendigis sur la nigra tabulo kaj kovris ilin. La objektojn mi aranĝis sur la tablo kaj kovris ilin, por ke la materialo ne flankigu la atenton de la gekursanoj.

Sekvas la leciono:

— Bonan vesperon, karaj gekursanoj!

— Bonan vesperon! — respondas ili.

— Jam estas tempo por laboro. Kion instruis al ni k-dino P. G.?

A. — K-dino P. G. instruis al ni pri geografiaj nomoj: riveroj, montoj, urboj.

Mi — Kaj kion instruis k-do S. Ĥ.?
B. — K-do S. Ĥ. instruis al ni pri gradoj de komparo.

Mi — Ĉu ni povas diri la nomojn de kelkaj riveroj?

C. — Iskār, Marica, Danubo, Jantra estas riveroj.

Mi — Ĉu Iskār aŭ Marica estas pli granda rivero?

D. — Marica estas pli granda rivero ol Iskār.

Mi — Kiu rivero estas plej granda el ĉiuj bulgaraj riveroj?

E. — La plej granda rivero el ĉiuj bulgaraj riveroj estas Danubo.

Mi — Kiu povas diri la nomojn de kelkaj montoj?

B. — Vitoŝa-monto, Rila-montaro, Pirin-montaro kaj Stara planina (Balkano) estas bulgaraj montoj.

Mi — Ĉu ili estas altaj montoj?

C. — Jes, ili estas altaj montoj.

Mi — Kiu el ili estas la malplej alta monto?

A. — Vitoŝa-monto estas unu el la malplej altaj montoj el ili.

Mi — Kiu urbo en Bulgario estas la plej granda?

B. — La plej granda bulgara urbo estas Sofio. Ĝi estas ĉefurbo de Bulgario.

Mi — Mi dankas, vi bone lernis la pasintan lecionon. Nun ni devas transiri al la nova leciono (mi malkovras la unuan tabelon, mi montras ĝin kaj komencas legi — la tabelo estas malkovrita ĝis la fino). La nova leciono estas: „Mitingo por la paco“. Nia celo estas lerni la sufiksojn: -eg-, -et-, -estr. Sur via folio estas skribita la rakonto „Mitingo por la paco“.

Mi legas malrapide, klare kaj laŭvoĉe, por ke ĉiu bone aŭdu kaj komprenu. Post mia tralego mi igas la gekursanojn legi la rakonton.

Mi — Gekamaradoj, mi tradukos.

Mi tradukas klarigante la nekonatajn vortojn, mi ne permesas al la gekursanoj skribi, sed nur aŭskulti kaj atenti. Post mia traduko mi igas la gekursanojn traduki.



Mi — Kiu deziras traduki? K-do D, tralegu kaj traduku!

Post kelkaj tradukitaj frazoj mi interrompas ilin kaj laŭdezure mi montras E. kaj J. ĝis kiam la tuta rakonto estas tradukita de gekursanoj kun mia helpo.

Mi — Karaj gekursanoj, rigardu! (mi malkovras la duan kartonon kun la vortaro). Ĉiuj estu pretaj por skribado!

Ĉiuj malfermas la kajerojn. Mi montras per la montrilo la unuan nekonatan vorton, ankaŭ la tradukon diktante malrapide, por ke ĉiu sukcesu skribi. Sekvas la dua, tria ktp. ĝis kiam la lasta nekonata vorto estas skribita.

Mi — Nun ni analizu la rakonton. Jen estas substrekitaj vortoj. Kiu legos kaj tradukos? K-dino P., legu kaj traduku! Kion signifas en bulgara lingvo la vorto „granda“?

P. — La vorto granda en la bulgara lingvo signifas голям, sed „grandega“ signifas оргомен, грамаден.

Mi — Kion signifas en bulgara lingvo plena, plenega? Laŭta, laŭtega? Svarmi, svarmegi? Kio estas „eg“?

D. — **-Eg** estas sufikso.

Mi — En bulgara lingvo наставка. Kion ĝi montras?

E. — La sufikso „eg“ signifas multe pli granda, pli bela, pli forta ol ordinara

Ĉiuj — La sufikso **-eg-** signifas (oni ripetas la regulon).

Mi — Mi petas, ĉiuj skribu!

Mi diktas en bulgara lingvo malrapide la regulon kaj ĉiuj skribas ĝin.

Mi — Jen estas kelkaj ekzemploj: belega, bonega, bategi, domego, pordego. La sufikson **-eg-** oni uzas ankaŭ memstare. Adjektivo **ega** signifas ролям, едър. Adverbo **ege** signifas много, прекалено. Ega homo, ega domo ktp. Gekamaradoj, kiu legos?

Mi igas A. legi la frazojn, kiuj entenas la sufikson **-et**.

Mi — Kion signifas flago? Flageto? Mano? Maneto? Kio estas **-et**?

A. — **-Et** estas sufikso.

Mi — Kion ĝi signifas?

A. — **-Et** signifas multe pli malgranda, pli malforta ol en ordinara senco.

Ĉiuj ripetas la regulon. Mi diktas en bulgara lingvo la regulon kaj ĉiuj skribas ĝin.

Mi — Jen estas ekzemploj: knabeto, urbeto, vilaĝeto, fermeti, malfermeti. La sufikson **-et-** oni uzas ankaŭ memstare kaj ĝi signifas: kiel adjektivo **eta** — малък, мъничък, дребен. Mi petas, skribu ĉiuj! Eta homo, eta domo, ktp.

Oni tradukas ilin.

Mi — Gekamaradoj, kiu legos plu?

Mi igas iun legi la frazon, kiu entenas la sufikson **-estr** kaj il legas: militestroj, milicestro.

Mi — Do, kion signifas milico? Militestro? Kion signifas milico? Militestro? Kio estas **-estr**?

— **-Estr** estas sufikso.

— Kion ĝi signifas?

— **-Estr** signifas ankoraŭ:

Ekzemploj: vilaĝestro, ŝipestro, ĥorestro. Mi petas, skribu ĉiuj: estro, estri, estraro. Do, karaj gekursanoj, kia estis nia celo hodiaŭ?

A. — Hodiaŭ nia celo estis lerni la sufiksojn: **-eg**, **-et**, **-estr**.

Mi — Ĉu vi jam scias la sufiksojn **-eg**, **-et**, **-estr**? Nun mi deziras montri al vi kelkajn objektojn, por ke ni pli bone lernu la sufiksojn.

Mi malkovras la objektojn kaj laŭvice montras ilin. Marŝante inter la benkoj mi montras la objektojn kaj metas komune al ĉiuj diversajn demandojn por ekzercado.

Mi — **Kio** estas tio ĉi? — Tio estas flago. — Ĉu ĝi estas granda?

— Jes, ĝi estas granda. — Kio estas tio ĉi? — Tio estas malgranda flago, flageto. — Jes, flageto.

— Kio estas tio ĉi? — Tio estas libro. — Ĉu la libro estas granda? — Ne, la libro estas ordinara! — Sed ĉu tio ĉi estas libro? — Ne, tio estas libreto. — Ĉu la libreto estas bela? — Jes, la libreto estas tre bela.

— Kio estas tio ĉi? — Tio estas krajono. — Ĉu la krajono estas ruĝa? — Ne, la krajono estas verda. — Ĉu ĝi estas granda? — Ne, ĝi estas ordinara. — Kio estas sur mia mano? —

Sur via mano estas tre malganda krapono, kraponeto.

— Kio estas tio ĉi? — Tio estas najlo. — Kion oni faras per najlo? — Per najlo oni najlas. — Kio estas tio ĉi? — Tio estas najleto? — Ĉu vi havas najleton? — Mi havas najletojn. — Sed kion mi montras nun? — Vi montras unu tre grandan najlon — najlegon.

— Kio estas en mia mano? — En via mano estas martelo. — Kion oni faras per martelo? — Per martelo oni martelas, oni batas, ekzemple, najlojn. — Kion mi tenas nun? — Nun vi tenas luksan marteleton.

— Jen estas alia objekto. Kia ĝi estas? — Ĉi estas ordinara tondilo. Kion oni faras per tondilo? — Per tondilo oni tondas? — Ĉu ĝi estas granda? — Ne, la tondilo ne estas granda. — Kion mi montras nun? — Nun vi montras tre malgrandan tondilon — tondileton.

— Kion mi faras? — Vi tranĉas. — Per kio mi tranĉas? — Vi tranĉas per tranĉilo. — Nun? — Nun vi tranĉas per tranĉilo — Sed nun per kio mi tranĉas? — Vi tranĉas per tranĉilego.

— Kio estas tio ĉi? — Tio estas kudrilo. — Ĉu ĝi estas granda? — Ne, ĝi estas ordinara. — Kion oni faras per kudrilo? — Per kudrilo oni kudras. — Kio estas tio ĉi? — Tio estas kudrileto. — Kaj tio ĉi? Ĝi estas kudrilego. — Kion signifas en bulgara lingvo kudrilego? — En bulgara lingvo kudrilego signifas *ръбепка*.

— Kion mi prenas nun? — Vi prenas kaŭĉukajn ŝuetojn. — Jes, ili estas la kaŭĉukaj ŝuetoj de mia nepo. — Ĉu ili estas grandaj? — Ne, ili estas tre malgrandaj kaj belaj.

— Jen estas ankoraŭ kelkaj objektoj. Kio estas tio ĉi? — Tio estas gantoj. — Ĉu ili estas miaj? (Iuj gaje ridetas, ĉar ili vidas, ke kompare kun miaj manoj ili estas ege malgrandaj). — Ne, ili ne estas viaj, ĉar estas tre malgrandaj. — Jes ili estas la gantetoj de mia nepeto. Ĉu ili estas belaj? — Jes, ili estas belaj. — Sed tiuj ĉi gantoj (mi metas ilin sur miajn manojn) ĉu ili estas miaj? — Jes, tiuj gantoj estas viaj. Ili estas grandaj.

— Karaj gekursanoj, fine jen unu pupo. (Ĉiuj ridas.). Ĉu vi vidis similan puĝon? (iuj — jes, aliaj — ne). Eble ne ĉiuj vidis. Ĉi estas rusa nacia pupo „Dunja“. Tre interesa pupo estas. Oni vendas ĝin eĉ en Parizo (Mi montras kvin pupojn kaj aranĝas ilin sur la benkon). Gekamaradoj (montrante la plej malgrandan mi demandas, kio estas tio ĉi? — Tio estas pupeto. — Tio? — Pli granda pupo. — Tio? — Ankoraŭ pli granda pupo. . . — Kaj tio? — La plej granda pupo. Ĝi estas pupego. (La leciono estas finita. Tiamaniere ĉiuj gekursanoj partoprenis kaj mi esperas, ĉiuj ĝin bone komprenis).

— Do, karaj gekursanoj, la leciono finiĝis, sed mi deziras doni al vi hejman laboron. Skribu po du frazojn kun la sufiksoj **-eg**, **-et**, **-estr** kaj po unu en kiuj la sufiksoj estas uzitaj kiel memstaraj vortoj. Ekzemple: Nia lernejo estas grandega. La ega homo estas bona. Mia frateto estas diligenta. La Etulino estas mia amikino. La nova domestro estas severa homo. Via estro estas inteligenta homo.

— Nia laboro por hodiaŭ finiĝis.

Ni diras unu al la alia „ĝis revido“

IV. CANEV

NEKROLOGO

Forpasis post longa malsano la 14-an de decembro 1961 k-dino VERA TODOROVA AKRABOVA — ekskasistino de la societo „V. Levski“ en Karlovo. Kun la familio ni funebras pro la perdo de tiu ĉi senlaca kaj oferema propagandistino de la movado.

*Kiom da abonantoj
vi varbis?*

III-a TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO EN RUSE

PROGRAMO

Sabato, 7 aprilo 1962

19,30—3,30 JUNULARA ESPERANTISTA BALO
(Solena malfermo, salutoj, arta programo, dancoj, ludoj, surprizoj k. a.) en la Domo de la ofiĉiro.

Dimanĉo, 8 aprilo 1962

9,30—11,00 ORATORA KONKURSO KUN PREMIOJ
en la salono de la Komsomolo — str. P. Karaminĉev

13,30—16,00 EKSKURSO al la Ponto de la amikeco kaj al la parko „Lipnik“.
Specialaj aŭtobusoj por la partoprenantoj forveturos precize je la 13,30 h. de la placo antaŭ la Urba popola konsilantaro. Je la 14,30 la aŭtobusoj forveturos de la Ponto al parko „Lipnik“.

16,00 SOLENA FERMO en la restoracio de parko „Lipnik“
16,30 Reveno en la urbon.

ALIĜKONDIĈOJ

La aliĝtakso por la balo estas 1,50 lv. sendataj al konto 15/1520 DSK — Ruse. La takso enhavas: enirkarton por la balo, ununoktan liton (la 7-an de aprilo, vespere), adresaron de la partoprenantoj kun aliaj utilaj informoj kaj ekskurson.

Oni aliĝu nur per la societoj, grupe, sendante la nomarojn kun la adresoj de la partoprenantoj al: RUSE, bulv. 9 Septemvri 98, Esperanto-societo (por la Organiza komitato de la balo). Rekte aliĝu nur la individuaj membroj de BEA. Aliĝante, nepre oni indiku la numeron kaj daton de la mandato, per kiu estas senditaj la aliĝtaksoj kaj la dezirantoj partopreni la ekskurson.

La adresoj de la gekamaradoj aliĝintaj ĝis la 15-a de marto estos publikigitaj en la adresaro.

Fina limtempo por aliĝo: la 25-a de marto 1962.

LA III-a TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO INVITAS VIN.

La Organiza komitato.

PAROLAS LA PREZIDANTO DE LA ORGANIZA KOMITATO

La gejunuloj ŝatas danci, volas ludi kaj amuziĝi, pro tio ni tute speciale zorgas pri la distra parto de la balo. Du orkestroj kun estradaj kantistoj ludos en la salonoj de la Domo de la ofiĉiro dum la tuta vespero kaj... mateno. Krome ni preparas multajn surprizojn, pri kiuj evidente ni ne ŝatus paroli nun. Riĉa bufedo zorgos pri la stomakoj de la laciĝintaj dancemuloj.

En la arta programo partoprenos unuagradaj artistoj de la urbaj teatroj. Samtempe ni preparas pure esperantajn numerojn, sed kun plezuro ni akceptis ankaŭ trafajn programsurprizojn de la aliĝontoj.

Dimanĉe, por la frue vekigintaj scivolemaj amatoroj de la lingvo kaj pri ĉiuj junaj aktivuloj oni organizos la tradician oratoran konkurson. Ni rekomendas al la sportis-

toj en la parolado, jam nun komenci prepariĝi. La temoj estas:

1. Komunismo — proksima estonteco de la homaro.

2. Kia Societo kaj junulara grupo estus bona?

Posttagmeze ni provos konatigi la gastojn kun la ĉefaj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo de Ruŝe. Ni penos varligi la restadon de la partoprenantoj en la balo kaj ĉiuflanke kontentigi ilin Tamen, de la gastoj ni ankaŭ atendas akuratecon ĉe la aliĝado kaj observon de la anoncitaĵ limtempoj.

Momĉo MOMĈEV

JAMBOL. La 24-an de decembro 1961 okazis la jarkunveno de Esperanto-societo „Maksim Gorkij“.

La ĉeestantoj per 1-minuta silento honoris la memoron de la forpasinta societano Conka Viĉeva.

La jarkunveno estis malfermita de k-do Georgi Jurdanov. Raportis pri la jara agado de la societo la prezidanto k-do Dimo Trudoljubov kaj la prezidanto de la kontrola komitato k-do Ĉono Panĉev.

La pasinta jaro estis tre sukcesoplena por nia societo. Dum tiu jaro la societo konsiderinde plimultigis siajn membrojn—en la komenco ili estis nur 32 kaj en la fino de 1961 j. la membroj atingis 175.

Funkcias 8 Esperanto-kursoj kun 144 partoprenantoj, precipe ĝelernantoj, de kiuj 127 fariĝis societanoj. La kursoj estas gvidataj de Spas Kânev, Stojan Popov, Petja Kraĉeva, Dimitar Bogdev, Zlatka Stoilova kaj Dimo Trudoljubov. Ĉiuj ĝelernantoj entuziasme lernas Esperanton kaj post mallonga tempo antaŭ ili malfermiĝas vasta fenestro al la tuta mondo.

Dudek kvarfoje la societo aranĝis siajn belartajn kaj propagandajn programojn, disaŭdigojn per la urba radioservo. Por la agado de la societo aperis multaj korespondadoj en „Bulgara Esperantisto“, „Nuntempa Bulgario“ kaj la distrikta ĵurnalo „Naroden drugar“. Aranĝitaj estis ankaŭ du propagandaj vitrinoj. Ĝis tiu jaro estis venditaj nur 430 markoj-brikoj, ja dum 1961 jaro oni sukcesis disvendi 205. La societanoj partoprenis en tutpopolaj manifestacioj de la Unua de majo kaj Naŭa de septembro; estis aranĝitaj laborbrigadoj, ekskursoj kaj renkontojn kun aliaj Esperantistoj. Por 1962 j. estis duoble plimultigitaj la abonantoj la la revuo „Bulgara esperantisto“ kaj „Nuntempa Bulgario“ ktp. La estraro laboris sisteme por ke altiru en la societon ĉiujn lernantojn kaj junulojn laboristojn.

Post la raportoj de la estraro kaj de la kontrola komitato sekvis kritikoj kaj rekomendoj por la estonta agado, en kiuj partoprenis Dimitar Kajrjakov, Stojan Popov, Cenka Kirĉeva, Angel Dimitrov, Kalinka Koseva, Stefka Panajotova, Bojan Kuŝev, Georgi Jurdanov,

Spas Kânev ka. En la raportoj kaj en la eldiroj de iuj societanoj estis kritikita k-do Aleksandâr Blagoev el urbo Jambol, membro de CK de BEA, por lia nesufiĉa agado.

La longjara esperantisto Ĉono Panĉev diris, ke da ĝejunuloj, kiuj estas la freŝaj fortoj en la vivo de nia societo, devas streĉi serioze siajn fortojn antaŭ la novaj grandaj estontaj taskoj.

La kunvenon salutis ankaŭ la maljuna esperantisto el urbo Elhovo k-do Ĵeljazko Nenov.

La kunveno akceptis enhaveplanan rezolucion.

La noveelektitaj estraro kaj kontrola komitato, konsistas precipe el junaj kaj energiplenaj esperantistoj. Tio estas garantio por estontaj sukcesoj de la movado en nia urbo.

Dum la nova 1962 j. ni penos ankoraŭ plivariigi nian agadon; plibonigos la internacian korespondadon. Apartan atenton ni dediĉos al la lingva perfektigo.

Dimo TRUDOLJUBOV

SOFIA. En la sofia popola lernejo „Stilian Peŝev“ la instruistino J. Kozacheva gvidis duran kurson por ĝelernantoj. La kurson finis 14 ĝelernantoj el la V, VI kaj VII klasoj. Ili ricevis siajn diplomojn dum solena kunveno, je la ĉeesto de lernantoj kaj civitanoj. La lernantoj kursfinintoj fondis infanan Esperanto-grupon kun estraro kaj ili regule kolektiĝas por perfektigi en la lingvo. Ĉiuj jam vigle korespondas kun infanoj el aliaj landoj, kio multe ĝojigas ilin kaj iliaj gepatroj.

J. KOZAĈEVA

KAZANLÂK. Pli kaj pli vastiĝas la Esperanto-movado. La urbaj societoj, ĝenerale pli malnovaj kaj multnombraj, devas helpi pri la vigliĝo en la proksimaj vilaĝoj, devas kuraĝigi la komencantojn. Kia estas nia praktiko tiurilate? Ni invitas aŭ vizitas elvilaĝan kursgvidanton, interŝanĝas lingvan sperton, rekomendas instrumentodon, donas informojn pri livero de lernolibroj kaj finas per enflamigaj vortoj pri la interkompreniĝa signifo de la internacia lingvo. Tio bone, sed kial la rezultoj ofte malfruigas? Ŝajne, ĉar oni preferas limigi kun sekaj rekomendoj anstataŭ krei konstantajn vivajn impulsigajn kontaktojn kun la vilaĝaj gekamaradoj.

Nia societo „Roza valo“ decidis praktike agi tiurilate kaj organizis akordeonan ensemblon komisiante ĝian gvidadon al k-do Andrej Panĉev. Fine de decembro 1961 la ensemblo efektivigis sian unuan propagandecelan viziton en vilaĝo Haĝi Dimitrov. Per muziko kaj deklamado la junuloj kaptis la korojn de la ĉeestantoj en la vesperfersto. Interalie, nia nova esperantistino Bl. Rajnova prelegis: „La mondo havas internacian lingvon“. Nia vizito estis



vere amika, senpera kaj impulsiga helpo. Altgrade inspiritaj pro sia unua sukceso la junuloj intencas baldaŭ viziti aliajn vilaĝojn.

Andrej PÂNĈEV

SOFIO. La poŝtista Esp.-societo „Heroldo“ en Sofio ankaŭ ĉi-jare aranĝis sian tradician novjaran amuzvesperon en la salono de la telefona palaco. La entro kontraŭ du markoj-brikoj permesis al ni tiumaniere helpi la kolekton de la sumo por konstruo de la Esperantodomo en Sofio. La riĉan programon de la vespero partoprenis multaj geesperantistoj inter kiuj k-dino G. Ganĉeva, la estrada artisto-esperantisto Zdravev, kantgrupo de la ŝtata ŝparkaso, ĉiuj multe aplaudataj. La organizita komitato tre bone plenumis sian taskon. Al ĉiuj, ni plej kamaradece dankas! Same ni dankas al la aŭtoritatuloj de la Ministerio de la transporto kaj komunikadoj, kiuj disponigis senpage la salonojn kaj tiamaniere donis sian helpon al la konstruo de nia Esperanto-domo.

Dimităr KARAGJOZOV

Kjustendil. Malfermita kurso. Por ĝia pago estis disgluitaj afiŝoj. Estis anoncita enskribado en la klubejo, sed tie neniu venis. Jen pro kio aktivuloj vizitis oficeojn kaj entreprenojn kaj tie propagandis kaj varbis kursanojn. Tiel formigis kurso de 20 personoj. Niaj samideanoj en Kjustendil montris, kiel ni devas agi. Ni ne devas atendi, ke la homoj mem venu al ni. Ni devas iri al ili kaj paciencie klarigi la celojn de nia movado. En tiu rilato montris persistan laboron la estrarano Liljana Mireva, membro de CK de BEA. Ĉar la kasisto de la societo ne aktivis, ŝi plenumis ankaŭ liajn funkciojn, kolektante la membro-kotizon. La kjustendilaj esperantistoj montris iniciatemon ankaŭ al la problemoj pri lernolibroj por la kurso. Ili vizitis kamaradojn lernintajn la lingvon kaj kolektis la necesan kvanton. Tia agado estas modelo pri tio, kiel ni devas batali kun la malfacilaĵoj kaj venki ilin.

ĈIAM POR EKZEMPLO

La Maŝinkonstrua Uzino „Forto“ en Jambol estas fiereco ne nur por Jambol, sed ankaŭ por la tuta nia juna Industrio. Ĝi plenumis sian kvinjaran planon por du jaroj kasepe monatoj. La uzino produktas precipe pluvmaŝinojn. Tiun ĉi jaron la uzino produktas kaj furagmuelilojn por USSR.

Inter la multaj laboristoj en la uzino laboras kaj juna laboristo Malĉjo Stojanov Valĉev. Li estas ne nur bona laboristo, kiu plenumas sian planon 153%, sed li estas ankaŭ bonega esperantisto. La esperanta insigno ĉiam staras sur lia brusto. Kun sia labora ekzemplo k-do Malĉjo Stojanov Valĉev estas bona propagandisto de Esperanto.

PROPAGANDA SEMAJNO EN PAŜTERA

La Esperanta Societo „Nova Epoko“ vigle agas. Dum oktobro ĝi organizis du esperantajn ekspoziciojn de korespondantoj kaj novaperintaj Esperanto-libroj. La unua ekspozicio estis en la Faklernejo por Tabako kaj la alia en libreja vitrino sur la ĉefa strato. En la politeknika mezlernejo oni eldonas trifojn en la monato esperantan murgazeton „Verda Stelo“. La ekspozicion vizitis pli ol 1000 gejunuloj-lernantoj. Laŭ la iniciato de la societo kaj la komsomolo estis enkondukita kiel nedeviga objekto la ellernado de Esperanto. En la faklernejo studas pli ol 50 gejunuloj kaj en la politeknika mezlernejo — 25 gejunuloj rezulte de la farita propagando. Kursgvidantoj estas k-doĵ Ŝterjo Kukuŝev kaj Sava Paunov, ambaŭ instruistoj en la menciitaj lernejoj. Ili serĉas korespondantojn por siaj gekursanoj. La ŝtato pagas al la instruistoj por la esperantaj horoj, kiel por ĉiu fremdlanda lingvo.

En la urbo la societo malfermis esperantan kurson por komencantoj-civitanoj. Ĝi estas gvidata de la diplomita gvidanto Jufem Ĉauŝev. La societanoj kunvenas ĉiujn tagojn je la 18-a horo.

Ŝterjo KUKUŜEV

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro), Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: P. Ĉ. Georgieva

Formato 71 × 100 16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia; mendo № 7476 61

DEZIRAS KORESPONDI

BELGIO

Jozeph Kamphens, Markt 34, **Oudenbosch** — sendas alumetetiketojn kontraŭ PM.

BRITLANDO

C. James, BM Witness, 58 Theobald's Road, **London W. C. 1** — kun bulgaroj.

BULGARIO

Letervesperon aranaĝas la 22-an de aprilo jaro kuranta la Esperanto-societo ĉe uzino „Georgi Dimitrov“ en urbo Ruse. Skribu amase al adreso: Esperanto-societo, DMZ „G. Dimitrov“, Ruse, Bulgario.

ĈEĤOSLOVAKIO

E-rondo, Osvětový dum, **Kojetín** — interŝ. fotojn de naturo.

Stanislav Štefan (maŝinisto, 36-jara), Olbrachtova 189 34, **Kladno** — kun ĉi pri la laborista movado, ĝia evoluo kaj batalo. Kun socialismaj landoj li deziras interŝanĝi spertojn pri la movado de brigadoj de komunisma kaj socialisma laboro. Interŝ. PI, E-aĵojn, PM pri temoj: birdoj, besfoj, fiŝoj.

GERMANIO

Joachim Gröschel (22-jara), Wiesenstr. 4, **Greiz/Thüringen** — kun ĉi pri ĉi.

INDONEZIO

S-ano R. Soeprapto (studento), Gowongan Dj. 5/242, **Jogjakarta** — kun ĉi pri ĉi; PI, fotoj, libroj.

K-do Sri Soedono Pr. (filatelisto), DjI. Surjoputran 41, **Jogjakarta** — interŝ. neuzitajn PM en kompletaj serioj laŭ katalogo „Yvert“ de 1961 kun filatelistoj el ĉi.

KAMBOĜO

Guo Dateng (instruisto de liceo, 47-jara), № 47 V. R. Ang Yukanthor, **Phnom-Penh** — kun ĉi pri edukado kaj E-movado.

MOZAMBIKO

Alvaro Santos (presisto), Avenuo 24 de Julio, 227-50 — flat. 42, **Spourenço Marques** — kun orientaj landoj.

FONDUSO „ESPERANTO-DOMO“

Se kiel la formikoj
aplikos ni la saĝon,
per niaj etaj brikoj
ni faros konstruaĵon.

(Daŭrigo).

Esperanto societo de la		
poŝtisto, Sofia	119,50	n. lv.
Ŝvilen Sokolov, Sofia	20,00	„ „
Akad. Prof. Nadjakov, Sofia	25,00	„ „
Ljubomir Avramov, Gabrovo	5,00	„ „
Boris Birov,	2,00	„ „
Ĉonju Pančev, Jambol	5,00	„ „
Dimo Trudoljubov,	20,50	„ „
Bulgara Esperantista koope-		
rativo, Sofia	90,00	„ „
Poljanovgrad, la societo	17,00	„ „
Ŝterju Kukuŝev, Peŝtera	10,00	„ „
E-societo „Nova Mondo“ —		
Ĉirpan	140,00	„ „

(daŭrigota)



NORVEGIO

Anne Karin Larsen (studentino de filologio, 19-jara), Wergelandsgate 16, **Haugesund** — kun ĉi pri muziko kaj sporto; L, PM, fotoj.

POLLANDO

Marian Jezyk, poŝtkesto 299, **Gliwice** — kun ĉi pri ĉi.

Karol Kowol, ul. Skowronskiego 32, **Gliwice** — interŝ. verkojn pri grotoj en E. kaj germana lingvoj.

Angopopo, poŝtkesto 321, **Gliwice** — interŝ. E-literaturaĵojn kaj priesperantajn artikolojn en naciaj lingvoj.

USSR

Anoj de E-rondo (14—17-jaraj gelernantoj) — kun ĉi, precipe kun Kubo. Adreso: Esperanto, Pionir-Domo, s. **Varna**, Ĉeljabinskaja obl.